Drondo 13a

*25-a de oktobro 2014*

# *Horaro*




**Loko:** Central YMCA Club, 112 Great Russell Street, London, WC1B 3NQ (ne longe for de metrostacio Tottenham Court Road)

**Horo:** Komenco je la 11:00. Se vi vidas Tim aŭ Joyce Bunting, ili povas gvidi vin al la ĉambro. Alie deklari al la stabo, ke vi venas por "Esperanto". (Se vi diras "Drondo, EAB ktp" ili ne scios pri kio temas.)

La horoj indikitaj sube estas proksimumaj. En la vero ni adaptiĝos laŭ la bezonoj de la temo.

**11:00** – Unua sesio: Ĉu en kelkaj landoj UEA rifuzu starigi Universalan Kongreson?

**12:00** – Dua sesio: Defendu nekomunan aŭ eĉ nepopularan opinion

**13:00** – Lunĉpaŭzo (en ekstera loko kaj ne inkluzivita kun la kotizo)

**14:15** – Tria sesio: Montevideo: 60 jarojn poste

**15:15** – Kafpaŭzo (en la drondejo sed ne inkluzivita kun la kotizo)

**15:30** – Kvara sesio: Miskomprenoj

**16:30** – Resumo kaj fino

**Post la Drondo:**

Kiuj deziras partopreni bonvenos ĉe The Penderel's Oak, 283-288 High Holborn (WC1V 7HP), kie kunvenos loka grupo de Esperanto-parolantoj. Ili komencos alveni ĉirkaŭ 17:15. Eblas manĝi en la trinkejo.

Drondo 13a

*25-a de oktobro 2014*

# *Ĉu en kelkaj landoj UEA rifuzu starigi Universalan Kongreson?*




La Internacian Junularan Kongreson en 2013 partoprenis nur 80 homoj. Tiu cifero malbone komparas kun tiu de la IJK en la antaŭaj jaroj: en Vjetnamio (2012: 145), en Ukraino (2011: 311) kaj eĉ en Kubo (2010: 181). La venontan kongreson en Fortalezo, Brazilo, partoprenis 150, preskaŭ do duoble la antaŭan.

Tiu malpopulara IJK okazis ne en iu fora lando treege malfacile atingebla, sed en Israelo, loko nelonge for de la plej aktiva angulo de Esperantujo. Pluraj homoj taksas tiun IJK bojkotita, ŝajne pro politikaj kialoj.

UEA fiere staras sur pozicio de politika neŭtraleco. Sed antaŭ tri jaroj ĝia ĝenerala direktoro, Osmo Buller, skribis, ke "kvankam UEA ne juĝas pri la politiko de la kandidata lando, UK ne nepre eblas ĉie."

Do, ni pritraktos la demandon, ĉu foje tiun principon pri neŭtraleco UEA ignoru por rifuzi proponon de iu lando ĉee starigi UK.













Drondo 13a

*25-a de oktobro 2014*




# *Defendu nekomunan aŭ eĉ nepopularan opinion*

La celo en tiu sesio estas deklari ion, kion vi opinias sciante, ke ĝi kontraŭas la kredon de la la plimulto … kaj defendi ĝin.

La celo ne estas ofendi sed pensigi, kaj provi konvinki aliulojn konsenti kun vi. Vi do devos klarigi la logikon malantaŭ tiu via opinio. Uzu faktojn, certe, sed ne onidiron. “La skotoj pagas pli imposte al la brita registaro ol ili ricevas” kaj “la skotoj ricevas pli el Westminster ol ili donas” ambaŭ legebliĝis lastatempe – fonto ne diro do necesas.

Se vi ne estas freneza pravigi viajn opionojn ne estus malfacila tasko, do kunportu plurajn!












Drondo 13a

*25-a de oktobro 2014*

# *Montevideo: 60 jarojn poste*







En decembro 1954 okaze de sia ĝenerala konferenco en Montevideo, Urugvajo, Unesko (Unuiĝint-Naciara Edukada, Scienca kaj Kultura Organizo) akceptis rezolucion rilate Esperanton. Aparte respondeca estis Ivo Lapenna, kiu post pluraj antaŭaj jaroj de laboro revenis kun la titolo "la heroo de Montevideo".

Tio estis granda momento en la historio de la Esperanto-movado, unuafoja rekono de internacia organo.

EAB ricevis taskon de UEA kontribui al la Jaro "Montevideo 60", kiu festas la originalan atingon.

Kion vi scias pri la fama rezolucio? Kiel vi taksas ĝin? Kion pri progresoj en la rilataj kampoj (edukado, scienco, kulturo) en la 60 postaj jaroj? Kaj kion povus fari EAB por plenumi tiun taskon?

*(Teksto de la rezolucio:*

IV.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto:

IV.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

IV.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.)

# Drondo 13a

*25-a de oktobro 2014*

# *Miskomprenoj*




Ŝajnas memevidente, ke homoj kiuj elektis lerni helplingvon certagrade interesiĝas pri komprenado. Certe Esperanto ofertas rimedon eviti (aŭ almenaŭ malpli okazagi) tion rilate lingvon.

Tamen neintenca miskomprenado neniam malaperos en la aeron. Eĉ homoj parolante lingvon denaske konatan ambaŭflanke povas miskompreni.

Ne temas sole pri lingva vidpunkto. Mangestoj, vestaĵoj, kulturaj normoj ... kondukas ili ĉiuj fojfoje al miskomprenado.

La nuna tasko: **Ĉiu parolas pri *rakontindaj* ekzemploj de miskomprenado.**

Plej bonaj estos tiuj kiuj estas **unuavide kontraŭpensaj sed depost sensohavaj.** Ankaŭ utilos **amuzaĵoj kaj aparte famaj ekzemploj kiuj metas ion en la embarason aŭ kaŭzis skandalon.** Ne parolu pri nur vortoj, sed ankaŭ pri aliaj ekzemploj. Povus temi pri politikistoj, turistoj, aŭ inter malsamaj generacioj de la sama fonto.

Por ĝuigi la diskutadon nepre evitendaj estas bazaj ekzemploj kiel "La piloto kaj la kontrol-tura stabano ne bone regis la anglan, do okazis miskomprenado kaj tiel detruiĝis la aviadilo kaj mortis ĉiuj ene de ĝi."

**Ekzemplo: Rosie la nitistino [Rosie the riveter]**

Rosie la nitistino estis inspirita de reala virino, Rose Will Monroe kiu naskiĝis en Kantono Pulaski, Kentukio en 1920, kaj transloĝis al Miŝigano dum la Dua Mondmilito. Ŝi estis nitistino ĉe aviadila fabriko en Ypsilanti, Miŝigano, konstruinta B-29 kaj B-24 bombaviadiloj por la usona aer-armeo.

Tiun afiŝon oni uzis en Usono dum la dua mondmilito kiel propagandilon. La celo estis kuraĝigi vironojn voluntuli sentime fari tradicie virajn labortaskojn dum ties prolukta neĉeesto. Du signifojn oni legas en ĝi: "Ni virinoj ja kapablas fari tian laboron" kaj "Ni samlandanoj venkos en la milito".

Tamen trian signifon kelkaj en la alianco povus vidi, kaj pro tio ebla miskompreno povintus okazi, se la usonanoj tiun propagandilon elportintus al siaj samaliancanoj. Kiu miskompreno?

